Karl Friedrich Müchler,

## Je plena glaso tie ĉi

*tradukita de Karl Vanselow*

Ĉe plena glaso tie ĉi
La zorgojn mi forgesis.
La vinon engorĝigis mi,
Sed la soif' ne ĉesis.

Do jam denove logas min
La glas' kun rea pleno.
Dum plu mi trinkas ankaŭ ĝin,
Revenas la ĉagreno.

...............................
...............................
...............................
...............................

...............................
...............................
...............................
...............................

Se ĉiam rekonstatas mi
Ĉe ĉiu plua guto,
Ke ĉiam plu kaj ĉiam pli
Bongustas ĉiu guto,

Min premas, kara amikar',
Dolore la konscio,
Ke devas mi rezigni, ĉar
Ne decas la ebrio.

. . .

Karl Friedrich Müchler,

## En kel' profunda sidas mi

*tradukita de Joachim Gießner*

En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino
kaj antaŭ mi da vino ĝi
de bona origino.[2]

La vinkelist' laŭ oportun',
li ĝojas, se mi drinkas,
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Soif' turmentas, ĉi demon',
ĝin devas mi forpeli.
Kaj tre efikas la propon'
per vino tion celi.

La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi
sin rozkolore ŝminkas:
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Sed la soifo kreskas nur
post ĉiu freŝa vino,
la konsekvenc' de la natur'
pro trinkofest' sen fino.

Konsolas min, dum sen konsci'
al planko mi nun sinkas:
Neniun suferigis mi,
sed trinkas, trinkas, trinkas.

. . .

Karl Friedrich Müchler,

## Im tiefen Keller sitz ich hier

Im tiefen Keller sitz ich hier
bei einem Fass voll Reben
bin frohen Muts und lasse mir
vom allerbesten geben.

Der Küfer zieht den Heber vor
gehorsam meinem Winke
reicht mir das Glas, ich halt´s empor
und trinke, trinke, trinke.

Mich plagt der Dämon, Durst genannt
doch um ihn zu verscheuchen,
nehm' ich mein Römerglas zur Hand
und lass mir Rheinwein reichen.

Die ganze Welt erscheint mir nun
in rosenroter Schminke,
ich könnte niemand Leides tun
und trinke, trinke, trinke.

Allein mein Durst vermehrt sich nur
bei jedem vollen Becher,
das ist die leidige Natur
der echten Rheinweinzecher;

Doch tröst ich mich, wenn ich zuletzt
vom Faß zu Boden sinke,
Ich habe keine Pflicht verletzt,
ich trinke, trinke, trinke.

. . .

[2] Mi, Manfred Retzlaff, proponas jenan ŝanĝon:
En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino.
Ja estas vin' en tiu ĉi
de bona origino.

http://www.poezio.net/version?poem-id=944&version-id=2130,1897,1896

*Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de* Karl Friedrich Müchler *(*1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* Karl Vanselow *(*1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-944-2130 (2014-06-09 12:55:12)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 119. Pri la tradukinto vidu la vikepediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`.

*Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de* Karl Friedrich Müchler *(*1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* Joachim Giessner *(*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-944-1897 (2013-12-03 19:31:25)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas sub "Weblinks" en la vikipedia paĝo* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_GieΓ§ner`. *La kanto estas interalie aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=GvyJZoqzw-8`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Karl Friedrich Müchler *(*1763-09-02 – †1857-01-12).*

*Arg-944-1896 (2013-12-04 16:21:15)*

*La teksto troviĝas en* `http://www.volksliederarchiv.de/text1425.html`. *Pri la verkinto Karl Müchler vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Friedrich_MΓëchler` *kaj* `http://bsbndb.bsb.lrz-muenchen.de/sfz65927.html`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.lieder-archiv.de/im_kuehen_keller_sitz_ich_hier-notenblatt_502280.html`. *Angla-lingva version troviĝas en* `http://www.musicaneo.com/sheetmusicsm-76213_down_deep_within_the_cellar.html`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.musicaneo.com/sheetmusicsm-76213_down_deep_within_the_cellar.html`. *La muzik-notojn verkis en 1802 la opera kantisto Ludwig Fischer. Pri tiu vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Fischer_(OpernsΓhnger)`.